



LA VERDA TRISKELO

2 numéros par an - parution : printemps / automne
VT 50 - marto 2023



LE 2 AVRIL / Assemblée Générale à Loudéac

Legu pri la okazontaĵoj / Agenda au verso

Multaj informoj atendas vin

- Al Finnlando
- El Turkio
- Pri elstaraj esperantistinoj

Enhavo

Edito	p2
La Federacio	p2-3
Lokaj korespondantoj	p4
Rilate al heredajo	p5
Okazis kaj okazos	p6-7
Omaĝoj	p8-10
Fremdaj Vizitintoj	p11-13
Pri lingvoj	p14-16
Traduko de libro	p16-17
Vojaĝo	p19
Agendo	p20

COTISATION 2023

- y avez vous pensé ? -

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif, soutenez
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous adhérez à un club, soit à
Xavier Godivier (coordonnées p.4)
pour adhérer à la fédération
uniquement .

AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>
Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,
plus fraîches et plus nombreuses,
envoyez un message vide à l'adresse :
bretonio-abono@esperanto-france.org

EDITO

Denove la *Verda triskelo* kaj Loudéac!

Jes ja, post unu jaro de paŭzo vi denove povas legi vian *Verdan triskelon*! Post pluraj jaroj de vigla laboro Jeannik transdonis la torĉon al nova teamo. Ni do dankas ŝin pro la multaj pasintaj revuoj, kaj dankas la novan teamon Hélène, Chantal kaj Josette ! Ni ankaŭ dankas al Laura, la nepino de Claude kiu proponis novan varmkoloran aspekton por nia revuo.

Kiel vi povos legi en la sekvaj paĝoj, tiu pasinta jaro retrovis iom da vigleco post la dormemaj kovimaj jaroj. Denove okazis diversaj Esperanto-eventoj en Bretonio, kaj ni denove ricevis eksterlandajn vizitantojn.

Ni decidis trovi la centran urbon Loudéac por organizi nian membrokunvenon, dimanĉon la 2a de aprilo, por faciligi la venon de plej multaj bretonaj esperantistoj. Estos bona okazo trovi nin kaj interŝanĝi.

Do ĝis baldaŭ en Loudéac!

Xavier Godivier

Retour du *Verda triskelo*,... et de retour à Loudéac !

Oui en effet, après un an de pause vous pouvez à nouveau lire votre *Verda triskelo* ! Après plusieurs années à s'en occuper, Jeannik a donc passé le flambeau à une nouvelle équipe. Nous la remercions donc pour les nombreux VT passés, et remercions la nouvelle équipe Hélène, Chantal et Josette ! Nous remercions également Laura, la petite-fille de Claude qui a proposé un nouvel aspect plus chaleureux pour notre magazine.

Comme vous pourrez le lire dans les pages suivantes, cette année écoulée a retrouvé un peu de vitalité après les années « covidesques ». Il y a eu de nouveaux des rencontres en espéranto en Bretagne, et nous avons de nouveau reçu des visiteurs étrangers.

Nous avons décidé de retrouver la ville centrale de Loudéac pour y organiser notre assemblée générale le dimanche 2 avril, pour faciliter la venue du plus grand nombre d'espérantistes bretons. Ce sera une bonne occasion de nous retrouver pour échanger.

Alors à bientôt à Loudéac !

Xavier Godivier

FEDERACIO

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE de la Fédération Espéranto-Bretagne

Dimanche 2 avril 2023 de 9h00 à 16h30 à la salle Malivel de Loudéac

Rappel de l'ordre du jour:

9h00 Accueil

9h30 -11h mot du président, approbation des rapports

d'activité et financier 2022, élection tiers sortant du CA

11h-12h30 Échanges sur les actions des clubs et projets 2023

12h30-13h30 Repas,

14h-16h30 Présentations, jeux, musique...

Un programme plus détaillé sera diffusé sur la liste de diffusion « Bretonio ». Le rapport financier sera présenté en AG et sur le site internet de la fédération.

Agadraporto 2022 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne

La agadoj de la Federacio iom post iom revigliĝas post la malfacilaj antaŭaj jaroj, sed masame laŭ la lokaj grupoj.

Lokaj grupoj aŭ kontaktoj en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Landerneau, Querrien.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

Membraro: ĉirkaŭ 150-200. Inter ili estas 58 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj 43 partoprenas al komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto kaj Espéranto Rennes).

Agoj de la federacio:

Prelegturneoj : okazis denove unu prelegturneo en Novembro de Murat Ozdizdar el Turkio. En julio okazis ankaŭ vizito de ukrainino Oksana kaj siaj filinoj, gastigitaj en pluraj urboj de Bretonio. La turneo de Murat kaj la vojaĝo de Oksana estis organizita de Josette.



Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* ne okazis dum 2022 sed organiziĝis nova teamo fine de la jaro kun Hélène, Chantal kaj Josette kiuj havas celon eldoni denove 2 numerojn en 2023.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> administrantoj: Bert kaj Xavier.

Reta diskutlisto de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun 205 abonantoj, administrata de Xavier.

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

Jara kunveno okazis en Greziljono, la 6an de majo 2022, por profiti la ĉeeston de bretonaj partoprenantoj dum korusa staĝo, kun 13 ĉeestantoj + 2 ne-membroj, inter ili pluraj partoprenis per Interreto.

Aliaj agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Partopreno kiel staĝanoj aŭ organizantoj de pluraj Bretonoj al eventoj en la kulturdomo de Greziljono: bicikla semajno, interkant-staĝoj, somera programo.

Correspondants locaux.

22	Armor Esperanto	Murielle Caré	06 70 60 58 18	murielle.care(a)me.com
22	Saint-Brieuc	Laurent Peuch	06 89 86 12 97	ltpeuch(a)me.com
22	Plouézec	Jeanne Pouhaer	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer(a)orange.fr
22	Locquémau-Cavan	Anne Desormeaux	06 04 01 27 64	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
22	Lannion	Maja Mériaux	06 04 49 84 48	meriaux.family(a)wanadoo.fr
22	Pleudaniel	Pierre Cardona	06 99 38 20 89	kortep(a)gmail.com
22	St Michel-en-Grève	Hélène Dubois	02 96 35 73 06	helene22dubois(a)gmail.com
22	Rostrenen	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre(a)gmail.com
22	Dinan	Philippe Stride	06 76 29 90 11	philippe.stride(a)wanadoo.fr
29	Douarnenez	Chantal Allen	06 74 15 78 09	chantalallen9(a)gmail.com
29	Morlaix	Claudine Guégen	06 86 88 44 69	Esperantosolidareco(a)gmail.com
35	Rennes	Xavier Godivier	06 51 45 84 83	xgodivier(a)esperanto.org
35	Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	06 35 32 02 00	jpdudloy(a)gmail.com
35	St Malo	Anne-Marie Argney	02 99 40 24 86	amargney(a)wanadoo.fr
56	Hennebont	Yvette Veslin	02 97 36 08 75	herve.veslin(a)orange.fr
56	Lorient	Jean dit Yannick Le Guennec	06 78 59 98 56	jean.le-guennec(a)wanadoo.fr
56	Hennebont+Lorient	Claude Bensimon	06 22 08 29 32	cloesb(a)yahoo.fr
56	Pontivy	Marielle Giraud	02 97 27 76 98	liber.terre(a)wanadoo.fr
56	Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	francismsg56(a)gmail.com
44	Nantes	Bruno Robineau	02 40 98 78 76	brobineau(a)orange.fr
44	St Aignan-de-Grand Lieu	Solange Goan	06 81 18 30 12	somigoan(a)gmail.com
44	Couëron	Luc Gouverneur	06 30 03 00 98	coueron-esperanto(a)orange.fr
44	Herbignac	Jean-Yves Santerre	02 40 88 96 98	jys.mys(a)club-internet.fr
44	St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

Le VT sera diffusé par internet. Cependant, pour ceux qui désirent recevoir la version papier, certains clubs pourront l'éditer. Si vous désirez le recevoir **par la Poste**, s'adresser à :

Manjo Clopeau 02 90 73 37 10 manjo.clopeau[a]gmail.com 12 rue de la Drisse 56450 **Theix**

Kion fari pri esperanto-biblioteko ?

Multaj esperantistoj havas belan esperanto-bibliotekon, kaj ankaŭ revuojn, filatelaĵojn, partiturojn, preparadon de kursoj, ktp

Kion fari pri ili kiam oni maljuniĝas kaj ke la gefiloj ne volas ilin ? Kion fari kiam kluboj definitive fermiĝas ?

Le 12an de januaro 2023, Bruno Flochon, prezidanto de Esperanto-France, organizis ege interesan kunvenon pri tiu problemo, kun diversaj kompetentaj profesiuloj, samtempe esperantistoj.

En venonta Monde de l'Espéranto, diversaj artikoloj konkrete montros kion kaj kiel fari.

La unua agado en niaj bibliotekoj estos unue recenzi la librojn, sed kiamaniere ?

Jen eta resumo de la kunveno, kiu okazis en la franca por interkompreno de ĉiuj.

Le 12 janvier 2023 a eu lieu par Zoom une réunion de discussion ouverte à tous en visioconférence sur le **devenir des documents anciens du mouvement Espéranto en France**.

Afin de **recenser** ces documents et de **chercher la meilleure solution de sauvegarde**, une démarche collective est en effet nécessaire.

La réunion était animée par Pascal Dubourg-Glatigny qui met son expérience et ses compétences au service du mouvement espéranto et est à l'origine de la démarche actuelle de sauvegarde des documents de voyage de Lucien Péraire.

Le besoin : conserver, numériser et mettre à disposition la « documentation ».

Il faut distinguer 2 grandes familles de documents, les ouvrages qui ont leur place dans une bibliothèque et les archives proprement dites, typiquement des documents administratifs.

L'UEA a commencé à transférer son fonds à la bibliothèque nationale de Vienne et à une « bibliothèque de conversation » (un exemplaire unique de chaque document est conservé mais non empruntable, avec quelle accessibilité en consultation ?). La bibliothèque de Vienne a le seul catalogue présumé raisonnablement exhaustif et numérisé. L'université nationale de Pologne a aussi un projet de numérisation.

Il existe des projets de numérisation d'ouvrages sur financement publics, dont le fonds Lucien Perraire (son voyage jusqu'en Chine) avec des fonds franciliens.

Le partenariat avec des bibliothèques ou autres institutions publiques pour la numérisation ou la conservation et mise à disposition des ouvrages nécessite généralement le transfert de propriété des ouvrages concernés à une bibliothèque publique. Cette dernière n'acceptera pas forcément des titres destinés à un public peu nombreux. La bibliothèque nationale de France a des exigences de ce type.

Avant de chercher une institution qui accepterait de prendre en charge la conservation de nos ouvrages, il faut obtenir un ordre de grandeur de la taille du fond qu'on pourrait ainsi transférer et donc identifier les groupes intéressés par ce transfert.

La Internacia Esperanta Arkivo a été créée pour sauver le contenu de bibliothèques qui ont dû fermer sur contrainte extérieure: la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet kaj la privata kolekto de Marc Vanden Bempt. Pour la mise à disposition des documents numérisés, la contrainte calendaire majeure est celle de l'expiration des droits d'auteurs, 70 ans après la mort de l'auteur dans l'Union Européenne.

Il est aussi nécessaire de cataloguer ce qui est disponible, tant pour la mise à disposition des formats numériques que pour l'identification des doublons avant centralisation pour conservation des ouvrages papier. Il existe des standards pour ces catalogues et des logiciels réalisant ou utilisant ces standards. Ces catalogues doivent aider à la localisation des ouvrages. Les bibliothèques publiques sont parfois capables d'interroger les catalogues d'autres bibliothèques et ainsi fournir un service de localisation.

La Kvinpetalo a hérité de la bibliothèque personnelle de plusieurs personnes importantes dans le milieu espéranto et fait uniquement du stockage pour l'instant.

Un compte rendu plus détaillé de cette réunion doit être publié dans Le Monde de l'Espéranto, ainsi que des indications utiles pour les suites à donner telles que la recherche de locaux de conservation, le recensement des ouvrages et leur accessibilité, la construction / intégration de catalogues...

Christophe Delahaye (Espéranto-Rennes) kaj Josette Ducloyer

Okazis kaj okazos.

KJARA

Eble kiel mi vi legis en interreto tiun mesaĝon:
Kjara dankegas ĉiujn pro la efika subteno en la voĉdonado de la kanto "Mozaiko" por la Eŭrovizia konkurso de kantoj en minoritataj lingvoj. Jen kion ŝi diras al vi ĉiuj:

*« Karaj amikoj kaj amikinoj,
mi tre feliĉas kundividi ĉi tiun belan rezulton kun vi.
Ĉi tiu venko ne estas mia, ĉi tiu venko estas Nia.
Esperanto vivas, ni vivas!
Mi kore dankas vin ĉiujn pro la tuta subteno kaj amo,
kiun vi sendis al mi.*

*Koran dankon al Federico Gobbo por la tre bela traduko de mia « Mosaico ». Koran dankon al FEI,
Vinilkosmo kaj Musica di Seta
Dankon al vi ĉiuj el la fundo de mia koro»*
KJARA

Video en Youtube <https://youtu.be/xT2hqNbCgRQ>



Mi serĉis vane la rezultojn sur la reto kaj demandis Flo-n, la responsulon de Eurokka. Jen lia respondo:

*« Same kiel vi mi malkovris ke estas pluraj Euroviziaj konkursoj :
-estas la oficiala kiujn ĉiuj konas kaj kiu pasas en ĉiuj televidoj en la mondo
- poste estas la Eurivizia konkurso LIET (pri minoritataj lingvoj) <http://liet-international.com/> -
http://eo.wikipedia.org/wiki/Liet_Internacia
- kaj alia pri minoritataj lingvoj kiu nomiĝas EML Eurovision Minorities Languages http://youtu.be/SR-k8U_9dqw kaj <http://youtu.be/xj9JdfjCMU>*

Kjara venkis en tiu ĉi lasta EML konkurso.. vi povas vidi ĉi tie <http://youtu.be/C-sBd5oB5xM> la kalkulojn de la poentoj de la ĵurio kaj fine la poentoj de la publiko kiu komplete ŝanĝis la voĉdonadon de la ĵurio.. Videble multe utilis ke la esperantistoj amase voĉdonis .. ŝajne neniuj atendis tion ĉe la organizantoj...

Jen mi ne scias pli ol tio , vi povas iom esplori interrete kaj en la paĝoj de la konkursoj por trovi pli da klarigoj.. pri la diversaj Euroviziaj eventoj....

Plej muzikamike

Flo !»

Post la aŭskultado de <http://youtu.be/C-sBd5oB5xM> mi finfine trovis la rezultadon. Kaj intervjuo de Kjara sur <https://www.liberafolio.org/2022/12/12/kjara-gajnis-alternativan-eurovidan-konkurson/> .

Okazis kaj okazos.

Pluezeka semajnfino en Pluezek 19-20an de novembro 2022

Jen kelkaj atestoj de la mirinda semajnfino en Pluezek,...

Jean-Pierre kaj mi, kun ĉirkaŭ 50 esperantistoj, ĝuis belegan semajnfino an Pluezek, okaze de la jara kunveno de Armor Esperanto. La programo estis riĉa, kun prelegoj de Michel Dechy kaj Murat, ekskurso, ludoj, legado salono, kursoj pri esperanto por komencantoj, progresantoj, babilantoj, libro-servo ...

Kaj precipe la pluezeka etoso, kiel ĉiam, tiel varma kaj bonkora !

Multegan dankon al la organizintoj de tiu evento, la du asocioj Armor Esperanto kaj Pluezek-esperanto !

Josette Ducloyer

Mi estis tiel kontenta revidi la geamikojn, kiujn mi ne plu vidis de 4 jaroj. Micheline, Maryvonne, Jeanne.....

Mi venis nur sabaton, kaj estis feliĉe renkonti de nove Michel Dechy, ĉar mi bonege komprenas kaj aŭdas lin.

Dankon ankaŭ pri la bonega etoso ! (kiel kutime)

Nikol Rizzoni



OUEST-FRANCE article publié le 23/11/2022 à 05h10

“Murat Ozdizdar, espérantiste turc, entouré de Michel Dechy, auteur d’une méthode d’apprentissage et d’une Ukrainienne espérantiste avec ses filles, samedi, à l’Ostréa de Plouézec |

Vendredi, Noël Grasset, le président de l’association Plouézec Espéranto, et Michel Dechy, auteur, ont rendu visite aux élèves de cours moyen de l’école Lefebvre pour une initiation à l’espéranto. L’écrivain a créé une méthode d’apprentissage à partir d’albums de Tintin traduits dans cette langue. Et samedi, l’association a reçu Murat Ozdizdar, un espérantiste turc qui a profité de sa venue pour partager ses voyages, facilités par la pratique de la langue internationale.

Un cours d’initiation était proposé à 14 h. D’autres cours sont organisés, chaque lundi, à Run David. Une quarantaine d’espérantistes étaient réunis, durant tout le week-end, pour se rencontrer et pratiquer la langue. Parmi eux, on pouvait retrouver des Rennais, Douarnenistes et même une Ukrainienne et ses deux filles.”

FORPASO DE RENÉE GRENIER

Renée Grenier forlasis nin. Delonga esperantistino, loĝanta en Vannes, ŝi agadis siamaniere kaj lasis spurojn en la memoro de multaj esperantistoj, inter kiuj la partoprenintoj en Pluezek.

Jen kelkaj tekstetoj de homoj kiuj krucigis ŝian vojon :

“Mi pensas, ke ĉiuj memoras/os la ĉiaman rideton de Renée malgraŭ la malfacilaĵoj de la vivo.

Ankaŭ mi deziras aldoni, ke mi ĉiutage uzas etan saketon faritan de ŝi ĉar Renée kudris multajn tolaĵosaketojn kiujn ŝi ŝatis donaci al geamikoj. Tiun saketon mi ĉiam havas en mia vestaĵo-poŝo ĉar ĝi enhavas gravajn dokumentojn (sangokarton, elektrokardiogramon, identecokarton ktp). Do tiel Renée finfine plu estas tutproksime de mia koro.”

Laurent

“Memore al nia amikino

Gaja, atentema, helpema, tia estis Renée. Ĉiam preta elsakigi iun paperon el sia ventrosaketo, en kiu ŝi zorge konservis ĉiajn diversajn listojn, memorigilojn, kanzonojn, aparte el sia devena Nordo, pri kiu ŝi fieris ! Ŝi kaptis ĉiun okazon propagandi por Esperanto, eĉ tendumante dum ferioj en Quiberon ... Ve, la perdo de sia duonulo antaŭ kelkaj jaroj okazigis al ŝi grandan frapobaton. Nun ŝi ripozu en paco kun Claude. »

Elinjo

« Ŝi estis ege bonkora persono, kun ĉiam rideto malgraŭ la malsano de sia edzo, kaj ĉiam la unua aliĝinto al la pluezeka renkontiĝo!”

Josette

“Mi konatiĝis kun Renée dum la pluezekaj renkontiĝoj en 2011. Ŝi partoprenis en tiu renkontiĝo ĉiun jaron kaj multe ĝuis ĝin.

Ĉar mi laboris en la kuirejo kun Françoise kaj Marie-France, ĉiun jaron ŝi alportis al ni donacon kiun ŝi mem faris. Ekzemple belegajn perlaĵajn ringojn.

Ŝi ŝatis kanti, kaj kantis plurfoje "Le p'tit quinquin" por ni.

Dankon al ŝi por tiuj bonaj memoraĵoj.” Hélène



ESPERANTO VANNES ZAMENHOFA FESTO

La 11-an de decembro 2022 okazis en Vannes la tradicia kaj fama Zamenhofa Festo kun kuna tagmezo, amuza teatraĵo «la izoliĝo» kaj omaĝo al Elisabeth Ledru, nia Elinjo, kiu dum multaj jaroj prezidis la asocion. Kvindeko da esperantistoj partoprenis en la festo.



Jen eltiraĵoj de tiu omaĝo, kiu memorigos belajn momentojn al la multnombraj bretonaj esperantistoj, kiuj partoprenis en la aranĝoj starigitaj de Elinjo.

Rappelle- toi : 2005 : flânant dans les allées du forum des Associations, tu fus abordée par Pierre Jaffré qui te donna un prospectus sur L'ESPERANTO, et te voilà embarquée!!...

C'était encore la belle époque, plusieurs cours étaient assurés par Roger, Pierre, Renée, Jacqueline et Michel, Françoise, ainsi que Marie et, occasionnellement Ewa qui de son côté enseignait à Berric et Sarzeau. Mais pour toi, il fallait aller plus loin dans l'apprentissage, alors tu as mis au point les "Sabatoj", un véritable succès. De nombreux Espérantistes venant des départements voisins y ont participé dont notre Doyenne, et regrettée GABY.

L'Association allait son train de sénateur, quand Françoise organisa le 1er Spectacle "La Guerre des Chapeaux" à l'occasion de la Fête Zam et tu nous as ensuite rejoints pour la Comédie Musicale "La Atendejo" créée par Jacqueline pour les textes et Michel pour la musique. Et tu as de ton côté créé et mis en scène "La Zapilo"... Elle fut l'occasion de grands moments de fous rires... Pierre, ton époux, organisait le buffet salé, et nous le sucré.

Puis, un jumelage tacite s'est imposé avec Jean-Yves et Maryvonne pour des pique-niques à HERBIGNAC, des journées festives et de partages, toujours agrémentées d'une découverte culturelle de la région.

L'accueil des étrangers espérantistes, des journées riches de découvertes culturelles et l'occasion de moments de convivialités inoubliables.

A tout cela s'ajoutent : les sorties à bicyclette, la journée au parc de Branféré, les parties de Molky, les week-end pêche et découvertes à Belle-Ile que vous organisiez avec Hervé et Françoise. Ton amour pour la mer a amené

*L'Association à participer à des **régates de Yole** à Vannes et Billiers.*

***Les Congrès** : LILLE où tu t'es investie avec Pierre, Françoise et Hervé dans la logistique. Plusieurs d'entre nous étions présents, Congrès de **MADRID** où le 22 Juillet 2018 Mireille Grosjean t'a remis le **diplôme du niveau 2**.*

***Le Café des Langues**, créé à l'initiative d'ESPERANTO VANNES, a permis de rassembler jusqu'à 60 personnes, avec l'anglais, l'allemand, l'espagnol, l'italien, le polonais, le breton, la langue des signes...et évidemment l'Espéranto.*

*Je terminerai par **l'Inauguration de l'Allée Zamenhof** qui a réuni de nombreux espérantistes bretons. C'était là une belle occasion de faire découvrir cette Langue Internationale au public vannetais.*

*Fallait-il voir un présage dans l'inauguration de cette **Impasse** ? Toujours est-il que depuis quelques années, l'Association, malgré sa participation, toujours, active aux **FORUMS**, n'a plus recruté. L'évolution de la technologie, en particulier Internet, ne nécessite plus d'appartenir à une association, mais je me dois de citer l'exception de Nathan et surtout d'Antoine, qui a, régulièrement, en fonction de ses disponibilités, pris part, non seulement, aux **"BABILADOJ"** hebdomadaires, mais aussi à certains spectacles.*

Chère Elisabeth, tu as été, pour nous la coach idéale, et en tant que Présidente, élue à l'unanimité en 2014, tu nous as toujours accompagnés, voire encouragés, et surtout boostés.

Et puis arriva mars 2020, la COVID.... Comme tous, touchés par les consignes du confinement, plus question de fêtes...

Alors, nous avons mis à profit les différents talents : Ewa, Edith, Pierre, Jean-Yves et Maryvonne pour la sélection des photos que nous avons fait défiler devant vous et Daniel pour la mise en page des deux albums.

De ton côté, tu t'es engagée dans la traduction pour la Gazette de UEA.

A notre grand regret Chère Elisabeth, tu as quitté, ta fonction de Présidente. Que deviendra l'Association ? L'avenir nous le dira...Ce qui est sûr c'est que nous conserverons tous ces souvenirs qui ont permis, à chacun d'entre nous de vivre de grands moments et de faire des rencontres, ô combien enrichissantes. Il y en aura d'autres nous l'espérons tous.

Tu continues d'ailleurs d'accompagner l'équipe (hélas restreinte), qui fait de son mieux pour maintenir l'Association "debout".

*Au nom de tous : un grand **BRAVO** et surtout **MERCI, MERCI !!!** Jes, dankegon al vi, kara Elinjo !*



Fremdaj Vizitintoj

24/10/2022-1/12/2022 Rondvojaĝo de Murat Ozdizdar tra Bretonio kaj «Loire-Atlantique»

Kun mia unua gastiganto Xavier en Pleugueneuc, mi vizitis pomppresejon kaj diversajn urbojn. Mi ĝojis malkovri unuan fojon «Le Mont St Michel».

Mi prelegis en Rennes pri Turkio: regionoj, urboj, historiaj lokoj.

Poste mi restadis 6 plenajn tagojn en Montfort ĉe Josette kaj Jean-Pierre.

Miaj plej ŝatataj ecoj estis vizito de kolektaĵoj kaj piedirado tra arbaro. Jean Pierre ĉiam ridetigis min kun sia ŝerca parolmaniero.

Mi trajnveturis al Quimper kaj mi gastis ĉe Chantal kiun mi renkontiĝis antaŭ 7-8 jaroj. Ni ofte promenis ĉe la marbordo. Mi prelegis pri Turkujo kaj eĉ instruetis la turkan lingvon.

Ni kune vizitis diversajn urbojn kaj ekskursis al la «Pointe du Raz», unika evento por mi.

En Lorient atendis min Claude Bensimon kun iu samideanino. La unuan tagon mi loĝis en Hennebont ĉe Claude kaj konatiĝis kun lia edzino Loes.

Matene alvenis mia kara amikino Marielle Giraud, kun kiu ni vizitis diversajn EMMAUS'ojn. Ni kune piediris ĉe la marbordo. Ŝi veturigis min en diversaj lokoj kaj ni ĝuis belan veteron.

La venontan tagon mi vizitis la muzeon en Hennebont kun esperanto gvidantino. Fakte la muzeo ne funkcias post septembro sed oni malfermis ĝin nur por mi. Vidu kio estas ESPERANTO !

Post mia prelego, mia gastiganto Yannick veturigis min al sia loĝejo kie li kuiris al mi bretonan manĝaĵon. Li veturigis min ĝis Pluezeko.

En la pluezeka renkontiĝo mia tasko estis paroligi partoprenantojn.

Post Pluezeko, gastigis min Anapola kaj Laurent. Kune ni vizitis marbordon kaj Emmaus'on. Ni pasigis tutan tagon ĉe Fransoazo Noireau kiu sentis sin iom pli bone kaj ĝojis pro nia vizito.

Mi instruis Esperanton kun Murielle Caré en ŝia mezlernejo, dufoje en la sama tago. Je la 11a, la infanoj laboris per Multlingva Akcelilo, konstruis frazojn, kaj ni ambaŭ korektis ilin. Ni kune manĝis kaj poste ni parolis pri Turkujo kaj ankaŭ pri turka lingvo al la infanoj. Mi instruis al la lernantoj kalkuli ĝis 10 en la turka kaj ili instruis al mi kalkuli ĝis 10 en la franca lingvo. Kompreneble fine ili ricevis turkan dolĉaĵon.



Alia interesa afero okazis post mia prelego en Sankta Briego. Iu demandis min pri la zaza lingvo kaj mi respondis, ke mi neniam havis eblecon renkontiĝi kun zaza parolanto. Poste ni preterpasis turkan restoracion kaj la posedanto invitis nin ĉiujn trinki teon. Dum nia trinkado mi renkontis du turkojn. La gepatra lingvo de unu el ili estis la zaza lingvo. Do li klarigis al ni pri sia lingvo. Kia kunokazeco, ĉu ne?

Poste mi vojaĝis al Nantes .

Luko atendis min ĉe la stacidomo. Mi gastis en Cournon ĉe Christiane kaj Maurice dum 5 tagoj.

Alain estas vinologo kaj preparis bongustan vinon BERLIGOU, kiun gustumis. Ni kune vizitis la muzeon de Jules Verne.

Mi prelegis pri MIA ESPERANTO VIVO. Ĉeestis Gwenole Vince kies gepatroj estis miaj unuaj gastigantoj en St Nazaire antaŭ pli ol 30 jaroj.

Dank'al miaj gastigantoj mi eksciis multon pri la historio de Nantes (haveno, LU...)

Christiane kaj Momo veturigis min al mia lasta gastigantino en ST AIGNAN-DE-GRAND LIEU, ĉe Solange Goan.

Tie mi prelegis kaj geedza paro tradukis mian prelegon al la franca.

Dum la paŭzo ni gustumis turkan supon preparitan de la sinjorino, kiu laboras en la societa domo.

La najbaro de Solange veturigis min al la lago Grand Lieu kaj ni kune boatumis. Li klarigis al mi pri sia vivo. Ni kune vespermanĝis en loka restoracio.

Mi denove deziras kore danki al Josette kaj al ĉiuj miaj gastigant(in)oj. Mi estis tre feliĉa kaj sentis min hejme.

Mi deziras al ĉiuj feliĉan novan jaron. Vi vere mankas al mi.

Murat Ozdizdar



Somera restado de ukrajnana-ukraina¹ familio en Bretonio



De la 8a ĝis la 25a de julio 2022 Oksana, 34 jaraĝa, kaj ŝiaj filinoj Solomia, 9j kaj Lada 6j, estis akceptitaj de esperantistaj familioj en Bretonio, Nantes kaj St Nazaire.

La patro daŭre restas en Kiev, kie li laboras kiel inĝeniero pri komputiko.

Jen resumo de la raportoj de la kluboj, kiuj akceptis ilin.

Josette: Unue ili tri vizitis la urbeton Montfort kaj la plaĝon de St Cast. Alia esperantisto, Jean-Lucien, akompanis nin ĝis St Cast kaj ni ĉiuj ĝuis la strandon per bela vetero. Poste mi adiaŭis Oksana-n kaj ŝiajn filinojn en St Cast kaj Jean-Lucien veturigis ilin al la hejmo de Xavier en Pleumeleuc.

Xavier: « Ni promenis en Mont Saint Michel kiun ni ĝuis kun bela vetero. Ni poste retrovis Murielle kaj Philippe Stride en Dinan fine de la posttagmezo por eta promeno gvidita de Philippe kaj vespermanĝa pikniko antaŭ foriro al Saint Briec.

Jean-Lucien ja sekvas ilin al Saint Briec sed reiros al Parizo poste, li ferias nur dum kelkaj tagoj en Bretonio. Mi jam konis Jean-Lucien ĉar li estas la kasisto de Esperanto-France kaj ni kunlaboris dum la du lastaj jaroj en la

estraro de UFE. Estis plezuro retrovi lin kaj ĝui tiun tagon "grupe", 5-ope en Mont-Saint-Michel kaj 7-ope en Dinan.

¹ "Ukrajno" estis la vorto registrita en PIV fare de Gaston Waringhien (1970), kaj ukrainanoj la loĝantoj sed la revizio de Duc Goninaz forigis ĝin kaj registris la radikon Ukrain- Ukrainio estas la nomo de la lando kaj ukrainoj la loĝantoj

Poste en Pordic ĉe Murielle Caré:

«La familio estas tre agrabla, ili ŝategas bani sin. Ni ankaŭ promenis sur strando sen akvo... en Pordic, ili neniam vidis tiel malaltan tajdon.

La familio ankaŭ partoprenis ĉetablabiladon kun anoj de Armor Esperanto lundon kaj ni preparis krespojn. La filinoj ne manĝas viandon krom kolbasoj.

Jean-Lucien tranoktis ankaŭ ĉe ni kaj vizitis amikon en la ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ li estas agrabla. Nun li rehejmenveturas al Svislando kie li loĝas.»

Poste en Douarnenez ĉe Chantal Allen

Chantal Allen (Ŝanjo): «Oksana, Solemiia kaj Lada restadis en mia nova logejo, dometo apud la strandoj des Sables Blancs kaj St Jean. Dum la unuaj tagoj, ili partoprenis en la mara festivalo de Douarnenez, vizitinda evento kun ĉirkaŭ 150 tradiciaj velŝipoj, ĉefe el francaj kaj britaj marbordoj, sed ne nur: la Standhart, mirinda rusa velŝipo estrita de ukraina marŝipestro kun internacia ŝipanaro allogis multnombre loĝantaron kaj turistojn. Oksana tie renkontiĝis kun pluraj ukrainoj, inter ili, viro kiu organizis vendejon dediĉitan al riparo de ukraina tradicia ŝipo. Vespere okazis koncertoj el Antiloj. Dank'al belega vetero, ludoj sur la strando kaj naĝado okupis la infanojn dum patrino povis trankvile ripozi. Vizito de la malnova centro de Quimper kompletigis la restadon.»

Poste en St Nazaire ĉe Chantal Barret

Chantal Barret: «Ni pasigis agrablajn momentojn kun Oksana Solomiia kaj Lada. La unuan tagon ni tagmanĝis hejme (Patrick kaj Chantal)...kun Solange (St Aignan de Grandlieu) kaj Armand (Nantes) kaj Bernard (St Nazaire)....kaj poste ni promenadis laŭ la haveno....kaj banis nin. Ni vespermanĝis ĉe ni kun Solange kaj Armand. La morgaŭon ni boatas sur la kanaloj de « La Brière », ni piknikis: . ĉeestis 10 personoj....kaj finfine....plaĝo kaj bano. Tre agrabla tago por ĉiuj.....Oksana petis, ĉu eblus restadi pli longtempe ĉar la du filinoj dezirus profiti plaĝon kaj banojn. Do ni zorgis kun Janick (Rennes) pri nova aranĝo, foriro merkrede anstataŭ lunde. Do lunde la du filinoj ludis sur la ludiloj el ligno sur la plaĝo. Ni tagmanĝis ĉe ni kun Solange....kaj posttagmeze plaĝo kaj bano. Marde ni veturis al St Brevin por vidi la serpentegon sur la plaĝo...ni tagmanĝis en krespejo....kaj posttagmeze plaĝo kaj bano..Merkrede ni veturigis Oksana-n Solomiia-n kaj Lada-n ĝis Redon kie ni rendezvis kun Janick.



Oksana kontaktis iun en Beauvais pri la foriro aviadile...sed ŝi ne ricevis respondon...do ni kontaktis nian filinon kiu loĝas apud Beauvais....kaj ŝi konsentis akcepti la ukraininojn de la 8a ĝis la 9a....kaj veturigi ilin ĝis la flughaveno.

Oksana estis ege kontenta ekscii tion»

Post sia restado en Bretonio, Oksana kaj ŝiaj filinoj flugis al Kiev por viziti siajn familianojn. Sed tie la vivo estis tro malfacila por la infanoj kaj ili decidis reveni al Bretonio. Oksana elektis Douarnenez, kiun ŝi ŝategas, pro la proksimeco de la maro kaj la agrabla etoso en la urbeto. Do, ekde septembro ili vivas denove en Bretonio kaj dum la lernferioj aŭ semajnfine partoprenas en la esperanto-aranĝoj en Greziljono, en Armor-Esperanto...

La infanoj vizitas la lernejon en Douarnenez kaj jam bone praktikas la francan.

Belan restadon en nia regiono !

Zazalingvon eblas aŭdi en San Briego.

Kadre de sia rondvojaĝo en Bretonio, nia turka amiko Murat prelegis pri lingvoj en Turkio lundon la 21an de novembro, en la fino de la posttagmezo. Interaliaj li parolis pri la zazalingvo kiun oni uzas en centrorienta Turkio. Murat konfesis, ke li ne bone konas tiun lingvon kaj eĉ, ke li neniam aŭdis paroli en zazalingvo.

Post la prelego, deko da esperantistoj vespermanĝis kune kun-Murat en itala restoracio en urbocentro. Fakte, en San Briego, ne estas facile trovi malfermitajn restoraciojn lunde (kaj ankaŭ dimanĉe).

Ni gaje babilis kaj bone manĝis. Post la manĝo, reirante al la veturiloj, ni preterpasis turkan restoracion. Tiam Ĵeromo petis de Murat klarigojn pri la pladoj de la menuo. Ni estis ĉiuj grupitaj antaŭ la montrofenestro kaj la estro de la restoracio eliris por respondi kio okazas. Amapola klarigis al li ke ni parolas Esperanton kun Murat, turka amiko.

Tiam la restoraciestro invitis nin por trinki turkan teon. Ene ĉeestis tri turkaj klientoj kun kiuj Murat tuj interŝanĝis turke. Post kelkaj minutoj, Murat ekridis kaj klarigis al ni ke unu el la viroj estis zazalingvano.

Kiuj estas la zazaŭj ?

Laŭ Vikipedio, la zazaŭj estas kurdaj popoloj kiuj parolas la zazakilingvon (*la langue zazaki*) kaj ĉefe loĝas en la montaraj regionoj kaj la malfekundaj ebenaĵoj de la centroriento de Turkio. Oni nombras inter 3 kaj 5 milionojn da zazaŭj en Turkio kaj ĉirkaŭ 300 000 en eŭropaj landoj (Germanio, Aŭstrio, Belgio, Francio ktp).

Dum babilado turke inter Murat kaj du klientoj, ni, francoj parolis kun tria kliento kiu flue parolis la francan lingvon kaj kun la estro : tiu ĉi ŝatis ŝerci. Post la trinkado de mentoteo afable proponita, ni forlasis la lokon.

Preskaŭ tri monatojn poste, la 10-an de februaro, Amapola proponis al mi tagmanĝi en tiu turka restoracio. Sed, kiam ni atingis ĝin, sur la pordo troviĝis aviztabulo « fermita. Dankon pro via kompreno ». Vidante la nomon de la restoracio, ni tuj komprenis. La nomo de la restoracio estas « Antalya » (« Antioĥio»), la nomo de urbo terure trafita de la tertremo. Certe la estro kaj lia edzino urĝe iris al Turkio por helpi familianojn kaj geamikojn. Ni ja pensu fratece pri la multnombraj viktimoj de tiu katastrofo.

Laurent Peuch San Briego

Manière de voir

La revue «Manière de voir» est produite par la rédaction du Monde diplomatique, qui a une édition en Espéranto (électronique seulement, <https://eo.mondediplo.com/>).

Le numéro de décembre 22 – janvier 23, de Manière de voir est consacré aux langues dans un sens assez large. Il illustre par exemple :

- comment les hiérarchies sociales sont inscrites dans le japonais
- comment on pousse à la création ou à la divergence de langues pour des raisons politiques dans les Balkans (ex Yougoslavie), au Luxembourg et en Islande.
- quelles sont les conséquences du tout anglais...

Je vous le recommande !

Christophe Delahaye, Espéranto-Rennes

MLA : Mon expérience avec des élèves de cycle 3

Enseignante de physique chimie au collège de Plérin, je propose un club espéranto aux volontaires. Le chef d'établissement et les familles apprécient cette ouverture culturelle.

La méthode **Accélérateur de multilinguisme** étant imaginée pour des élèves de cycle 3 (CM1, CM2 et 6^e), je propose ce club aux 6^e avant l'apprentissage pour tous d'une nouvelle langue en 5^e.

Je retrouve les élèves une fois par semaine (et non deux comme préconisé par cette méthode), sur le temps de pause de midi, une partie de la méthode peut donc être abordée sur une année scolaire. Des élèves déjà engagés vers d'autres langues en famille ou à l'école viennent à l'espéranto. Apprendre une langue étrangère ou régionale incite à en découvrir de nouvelles. Je fais le choix en septembre de reprendre de nouveaux élèves pour semer de nouvelles graines. Des 5^e rejoignent le groupe de 6^e en février. Dans l'établissement, tous les élèves du collège auront bientôt entendu parler de l'espéranto, grâce à la visite d'espérantistes étrangers (Affichage et quiz proposé à tous).

La **méthode MLA** présente à mon avis plusieurs avantages.

1- Elle utilise **peu de morphèmes**, ceux-ci sont répétés au fil des leçons et les élèves les acquièrent assez vite ou alors savent où les retrouver (dans un texte, une chanson apprise...)

2- Les **cartes colorées** proposées sont une aide formidable pour que les élèves forment des phrases dès les premières séances en étant critiques vis à vis du sens, sans se préoccuper de la forme. En respectant l'ordre des cartes colorées proposées, les phrases sont grammaticalement correctes. C'est un atout car les élèves enregistrent dès le départ des « modèles justes » de phrases.

Ils les mémorisent car ils aiment les écrire au tableau et y vont de plus sans crainte de faire d'erreur. C'est valorisant en particulier pour les élèves dyslexiques, qui peuvent écrire sans faire d'erreur. Ces cartes colorées leur donnent ensuite des ailes pour imaginer de nouvelles phrases, affirmatives puis interrogatives, en ajoutant trois nouvelles cartes « Ĉu, kiu, kio ». Créer des phrases est très gratifiant pour un élève qui découvre une nouvelle langue. Voici un exemple d'une élève débutant l'an dernier « Ĉu mia amiko estas tablo ? » Voyant que je marquais une hésitation, l'élève a ajouté en souriant : « Mi estas seĝo ! ».



3- Le « **Cahier de l'élève** » préparé par Esperanto France et mis en page par Emmanuelle Richard plait beaucoup aux élèves : ils peuvent écrire dans ce cahier, y ajouter des dessins représentant le vocabulaire utilisé ou une phrase lue ou créée, ce qui leur permet de s'approprier ce cahier et d'en prendre soin.

4- Le **lexique par leçon** est une aide précieuse qui évite beaucoup de questions, l'adulte n'est pas la seule ressource face à une difficulté sur un mot. Il permet aussi un pas de côté par rapport à sa langue maternelle (mi/mia/miaj - vi/via/viaj) et par exemple une explication sur les adjectifs possessifs reconnaissables à la terminaison en a, pour éviter la confusion « mes/mais » en français.

5- L'avantage est également que tous les élèves ne font pas la même activité au même moment, **toutes les activités sont à portée de main** sur les différentes pages et je peux orienter chacun vers une activité qui me semble appropriée. Les chants sont proposés lors d'un moment commun à tout le groupe et certains mémorisent les paroles rapidement. Chanter ou bien jouer à l'aide de cartes permet de progresser de façon ludique.

6- L'an dernier, les élèves ont peu utilisé l'ordinateur, je vais essayer de le proposer davantage cette année. C'est un autre avantage de la méthode, les **données sont accessibles en ligne** et des **exercices** sont proposés, chacun avançant à son rythme.

J'encourage les enseignants de cycle 3 à tester cette méthode MLA avec l'appui d'un espérantiste.

Liens vers les documents en accès libre :

<https://lernu.net/instruado/gvidlinioj> <https://lernu.net/instruado>

Esperanto France a rectifié et corrigé la méthode en français, en éditant un cahier en couleurs à compléter par les élèves. La première version est ainsi testée cette année scolaire 2022-2023.

Un enseignant volontaire peut faire la demande pour recevoir gratuitement un cahier enseignant, des cahiers élèves et des cartes pour construire des phrases.

Demande à adresser à mla@esperanto-france.org

Murielle Caré
murielle.care@me.com

Informoj.

Maja Mériaux informas nin :

En LANNION, kursoj de Esperanto, ĉiun mardon en Solidareca Domo (ekcepte dum la lernejaj ferioj):

- Unua nivelo : mardon de la 17a ĝis la 18a
- Konversacia grupo : mardon de la 18a ĝis la 19a kaj duono. Dum tiu sesio, ni babilas en Esperanto kaj tradukas tekstojn pri ekologio.

Solange Goan informas nin:

La 5-6 an de OKTOBRO 2024 okazos en la salono «L'Héronnière», rue du Pressoir en SAINT-AIGNAN DE GRAND LIEU, apud Nantes, , SUDBRETONA SEMAJNFINO kun prelegoj, spektakloj, granda esperanto festo ! Jes, vi bone legis, en 2024... Ĉar la loko estas tiel agrabla, ke jam nun oni devis rezervi ĝin ...

Traduko de libro

« Pliigita biodiverseco » (La biodiversité augmentée) de Sébastien Heim

Pura ĝardeno ne taŭgas por la vivo.

Insektoj ege bezonas diversecon, plantdiversecon, putrantan lignon, densajn kaj divers-specajn heĝojn el lokaj esencoj, kiuj estas bonegaj koridoroj. Ili bezonas biotopojn kun multaj kontrastoj kaj kaŝejoj, sablo, ŝtonoj, marĉetoj, sekaj aŭ humidaj medioj laŭ la specioj.

Eta faŭno bezonas kompleksecan malordon, vegetalan kaj mineralan, por disvolviĝi aŭ pluvivi.

Ĉi tiuj bestoj bezonas kaŝejojn kaj manĝaĵon. Fakte, insektoj bezonas ĝuste la malon de tio, kion urĝemaj homoj produktas.

Kiel kunporti belan biodiversecon en via ĝardeno ?
Kaŝejoj kaj nutraĵoj, mi forte insistas, eĉ se temas pri evidenco !

La plantoj kaj herboj, kiuj estas nedezirataj kaj tro ofte ekstermitaj, utilas al ĉiuj bestetoj. Sciu, ke ne ekzistas fi-herboj, nur malbonaj agmanieroj.

Plej simple malagadu en pluraj lokoj de via ĝardeno, ĉefe se ĝi estas granda. Nenio estas pli aĉa ol vastaj razitaj spacoj. Tiam, vi povos aranĝi diversajn areojn en via ĝardeno, laŭ ĝia orientiĝo kaj grundtipo.

Kiel komenci ? La « startigilo ».





Por obteni tion, kion mi nomas « pliigitan biodiversecon » ĉe vi, unue taŭgas lasi kompoŝtamasojn en pluraj lokoj de via ĝardeno, laŭ ĝia surfaco. Poste, aranĝu grandajn kvantojn da morta ligno, prefereble el foliarboj, kaj starigu « branĉhedĝojn », en bonelektitaj lokoj, plibone ĉirkaŭ la ĝardeno. Necesas plani grandajn volumojn, kaj aldoni novajn branĉojn al la origina amaso almenaŭ unufoje jare.

Tiele venos unue diserigantoj, en tre diversaj vivoformoj, reprezentataj de centoj da specioj. Poste venos la predantoj de tiuj diserigantoj, poste la predantoj de la predantoj kaj la regulantaj parazititoj. Supre, amfibioj, reptiloj, birdoj kaj mamuletoj. Mi nomas tion la « startigilon », tio estas tiu provizo de biomaso kiu formas la bazon de kompleksega nutroĉeno.

Tiam, nepre falĉu nur tion, kio necesas por via vivspaco. Farante tion, vi helpas rampajn kaj malaltajn plantojn en falĉitaj areoj, kiuj ne povas kreski aliloke (rampa trifolio, rampa bugulo, potentilo, leontodo, violo, ktp.). Fine, nepre lasu grandajn areojn bone kovritajn de altaj herboj, kiujn vi falĉos fine de aŭtuno. Tiel, vi favoros diversajn speciojn laŭ la falĉa periodo, vi vidos.

Sed tio ne estas ĉio. Fakte, ankoraŭ necesas lasi surfacojn, kiuj neniam estos falĉitaj, por konservi grandan rezervujon da insektoj. Multaj insektoj travintras fiksita sur la sekaj kaj altaj tigoj, sub formo de ovoj, nimfoj aŭ krizalidoj. Raŭpoj ankaŭ travintras en la kavaj tigoj de sekaj plantoj. Se vi falĉas ĉion samtempe, vi detruas nekalkuleblan nombron da insektoj. Efektive, se la ovoj aŭ la krizalidoj finiĝas sur la tero, ili putros pro vintra humideco. Tamen, oni devas forigi rubusojn kaj arbidojn el tiuj areoj, kiuj iĝus arbaro post pluraj jaroj sen falĉado.

La klubo de Lannion

Vojaĝo

Pasporta Servo en Finnlando

Kial ne profiti de nia vizito al la filino, por provi Pasportan Servon en fora lando? En januaro 2023 Murielle kaj mi planis flugi al Helsinko, kie loĝas nia knabineto kun sia finna edzo. Eblis gastigi en ilia apartamento dum unu semajno, sed ni trovu aliajn gastigantojn por eventuale alia restado.

Tute hazarde, la mapo de Pasporta Servo tuj proponis solvon. Ne for de Helsinko kuŝas du gravaj urboj vizitindaj: Tampere kaj Turku. La vigla aglomeraĵo de Tampere estas la dua de Finnlando kaj plu kreskas. Tie troveblas la urbo Nokia, iam fama pro la poŝtelefonoj. Turku estis la ĉefurbo de Finnlando kiam Svedio regis super la lando. Ĝia kastelo estas mirinda. Mirinda ankaŭ estas, ke en tiuj du urboj kelkaj esperantistoj proponas gastigi la vizitantojn.



Per nia plej bela plumo, ni do skribis al Maku kaj Mikko, petante, ke ili gastu nin po du noktojn en siaj loĝejoj. Ĉar restis du noktoj liberaj, ni ankaŭ sendis mesaĝon al Saliko de Hyvinkää, sur la vojo inter Helsinki kaj Tampere. Post kelkaj tagoj, la afero estis finplanita: dimanĉon ni enrajniĝos en Helsinki por Hyvinkää. Mardon ni veturos de Hyvinkää al Tampere. Ĵaŭdon de Tampere al Turku, kaj reen de Turku al Helsinki sabaton.

La unua renkontiĝo estis ege ĉarma sed iom konfuza. Ĉar ni antaŭe skribis, ke ni alvenos en la komenco de la posttagmezo, Saliko atendis nin por manĝi je la 12-a. Mi ĉi tie klarigu, ke la finnoj kutime tagmanĝas je la 11-a. Se iam vi vagas en Finnlando, serĉu la vorton « lounas »; ĝi aperas en la plej diversaj lokoj, eĉ en muzeoj, bibliotekoj, urbodomoj. Tie vi ricevos supon, legomojn, kolbasojn, dolĉaĵojn, teon aŭ kafon kontraŭ dekduo da eŭroj. Tiujn « lounas » oni proponas ekde la 11-a, ĉar tio estas la tagmezo por la laboristoj. Do evidente la posttagmezo komenciĝas je la 12-a. Ĉu ne?



Post lastatempa klarigo, ŝi retrovis nin en la stacidomo de Hyvinkää je la 14-a. De tie Saliko ĉiĉeronis al sia domo, tra muzeo kaj arbaro. Estus tro enue uzi buson aŭ trotuaron, do ni ĝoje sekvis nian viglan gvidanton sur neĝo kaj sub arboj. Tiu, kiu deklaras koni iun finnon ne ŝatanta la naturon, mensogas. Finfine ni hejmeniris je la 17-a, ĵus antaŭ la sunsubiro. La morgaŭan ni kune promenis en la ĉirkaŭaĵo matene, kaj lasis nian gastiganton ripozi posttagmeze. Murielle kaj mi trairis la urbon por viziti. Estis amuze renkonti surneĝajn biciklantojn kaj skiantojn. Tamen ni estis en urbo.

Venis tempo por adiaŭi Salikon. Ŝia filo, kiu posedas aŭton, proponis iom veturi tra kamparo antaŭ la enrajniĝo. Neĝo, kampoj, neĝo,

preĝejo, neĝo, vilaĝo, monteto, arbaro, neĝo, lago, neĝo. Ni babilis angle, ĉar li ne scipovas Esperanton. Mirindajn pejzaĝojn li montris.

En urbo proksima al Tampere ni alvenis ĉe la familio je la 16-a, samtempe kiel la infanoj revenantaj de siaj lernejoj. Ni kune vespermanĝis je la 17-a kaj la patro proponis gvidi nin al sia urbo tra arbaro kaj laŭ lago. Jes ja la suno jam malaperis, sed pro la blanka neĝo ni ne suferis pro malhelo. Kontraŭe multaj padoj estis lumigitaj, tial la infanoj povas luĝi, la skiantoj skii, la biciklantoj bicikli, kaj ni promeni. Post la promonado ni retrovis la tutan familion por manĝi kelkajn dolĉaĵojn, antaŭ ol la infanoj enlitiĝu. Ni denove renkontis la patron la morgaŭon je la 12-a, rapide manĝis « lounas » kaj kune vizitis la



urbocentron de Tampere, antaŭ ol li revenu hejmen pour zorgi pri la infanoj.

Ni retrovis lin kaj la edzinon en la vespero kaj agrable babilis dum du horoj antaŭ adiaŭi. La sekvantan matenon ili estos frue laborantaj.

Jam estas jaŭdo kaj la buso atendas nin por veturi al Turku. Alvenante ĉe niaj gastigantoj, ni nur lasis niajn dorsosakojn kaj tuj iris al la kastelo. La familio ne havis tempon por ĉiceroni, sed post dekdu tagoj en la lando ni sufiĉe konis la elementajn bazojn por elturniĝi. Poste, agrablan vesperon ni trapasis kun la familio: post la vespermanĝo unu el la infanoj ludis pianon kaj la gepatroj indikis per mapo kelkajn lokojn vizitindajn. Vendredon estis tago de vizitoj.

Ni hejmeniris antaŭ la familio, kiu tiam spektadis hokeon, ni vespermanĝis en la domo, kaj atendis ilin por adiaŭi. Kiel kutime la adiaŭo daŭris kelkajn horojn. La knabo ludis kelkajn notojn el « La Marseillaise » antaŭ la enlitiĝo. Agrablan vesperon, pere de Esperanto, sed ankaŭ de la angla, la finna kaj la rusa. Ses ni estis en la kuirejo, la du infanoj komprenis la finnan pro la patro, la rusan pro la patrino, la anglan pro la lernejo — kaj ankaŭ certe la devige lernatan svedan sed ni ne provis. La patrino komprenis Esperanton sed respondis en la angla. Ŝajnis, ke la patro komprenis kaj parolis ĉiujn, kaj ankaŭ la germanan kaj la italan. Eĉ la francan li povas iom legi.

Sed tempo forflugas, kaj ni mem nun flugu al Francio.

Dankon al Louise, Matti, Kristiina, kiuj venis al ni en Helsinki.

Dankon al Saliko, Maku, Mikko kaj iliaj familioj pro gastigoj, ĉiĉeronoj, konsiloj, babiladoj.

Dankon al Pasporta Servo, kiu ebligis tiujn ĉi renkontiĝojn.

Jérôme Caré, Pordic 22

<https://www.pasportaservo.org>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tampere>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Turku>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Hyvinkää>



Farendaĵoj notindaj en via kalendaro



Printempa studperiodo En Saint Briec 25 an kaj 26an de Marto

Kursoj por komencantoj,
komencintoj, progresantoj, kaj
babilantoj.

Senpaga kurso por komencantoj kaj
junuloj ĝis 25 jaroj.



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Gresillon

Printempas 14an ĝis 22an de Aprilo.

Kursoj kun Przemek, Paweł, Szabolcs
aŭ Marion.

Trapasu KER-ekzamenon

Prelego, koncerto, filmo, migrado, ktp

Esperanto-tempo

Sabaton la 1-an de Aprilo 14h-17h30

Esperanto Vannes

Informoj :

esperantovannes@gmail.com

Multaktivaĵo

24an ĝis 30an de Aprilo.

ĥora kantado, migrado bicikle/piede, E-kurso.

Koncerto, filmo pri la kulturoj en Pakistano,
prelego, volontula laboro, .



Interasocia kongreso En Liono 6 an ĝis 8an de Majo

Konferencoj, koncertoj, vizitoj de
Liono, esperanto kursoj kaj
ekzamenoj, membro-kunveno de
Esperanto France.

Informoj :

<https://esperanto-france.org>

Informoj sur

<https://gresillon.org>